
No 02
1966

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

## 18-a INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO

de la 14-a ĝis 20-a de majo 1966-a

Adreso de L.K.K.: W.L.van Leeuwen, Stationsplein 25 AMSTERDAM (C).
Banko: Algem.Bank Nederland, Damrak 33 Amsterdam. Konto 9144889.
Poŝtĉekkonto: 359290 (je nomo: W.L.vanLeeuwen, Stationsplein 25 Amster.).
Kongresejo: N.V.-Huis, Oudegracht 245, UTRECHT.

HONORA KOMITATO: La L.K.K. havas la plezuron prezenti al vi la jenan honoran komitaton:

Inĝ.S.A.Posthumus, ŝtata sekretario por fervojaj aferoj en la Ministerio de Trafiko kaj akvostato;
Inĝ.J.Lohmann, prezidanto-direktoro de la Nederlanda Fervoja Kompanio;
Drs.J.Dorjee, direktoro de la transporta kaj ekspeda entrepreno "Van Gend en Loos"; Mr.C.J.A.de Ranitz, urbestro de Utrecht;
G.J.Alink, prezidanto de la Dungitar-konsilantaro ĉe la fervoja kompanio;
L.Kasje, ĉefstaciestro de Utrecht C.S.

KONGRESKOTIZO: ĝis 1-4-1966: ned.gld. 25,-; post tiu dato: ned.gld. 35,-. Por la pensiuloj, edzinoj kaj junuloj malpli ol 19 jaroj la sumo estas sinsekve: ned.gld. 15,- kaj 20,-.
Simpatianto (kiu ne vizitas la kongreson) pagas ned.gld. 5,- (tuj post la kongreso li ricevos la kongresinsignon kaj aliajn kongresaĵojn).

LIMDATO: 1-5-1966. Por tiuj kiuj aliĝas post tiu dato aŭ alvenas en la kongreso sen antaŭa aliĝo L.K.K. povas akcepti nenion respondecon pri tranoktado en la kongresurbo aŭ/kaj pri la partoprenado en la ekskursoj.

Loĝado: Mi atentigas vin ke la hotelprezoj menciitaj en la aliĝilo estas inkluzive la matenmanĝo sed ekskluzive la servmono. La kapacito de la hotelĉambroj en Utrecht estas limigita; mendu tuj la hotelon de via elektita kategorio. Ĉar multaj aliĝintoj deziras tranokton en hotelo de kategorio D) eble jam nun la stoko da litoj en tiu kategorio estas elĉerpita. Ni pritraktas la mendojn laŭ enveninta vicordo. Mi atentigas vin pri la fakto ke la prezoj de ĉiuj hotelkategorioj estas inkluzive la matenmanĝon! (nur la servomono ne estas enkalkulita).

GLUMARKOJ: Vi povas ankoraŭ mendi glumarkojn ĉe la sekretario de L.K.K. La prezo estas po ned.gld.0,50 por bloko kiu enhavas 25 ekzemplerojn.

EKSKURSPLANO: En ĉiu aŭtobuso iu el niaj nederlandaj gekolegoj ĉeestos por la gvidado. Speciale por plifaciligi ilian taskon ni verkigis gvidilon pri ĉiu ekskurso por ke ili mem estu bone informitaj.
La tagmanĝo dum la duontaga ekskurso je ĵaŭdo (ĉielirtago) ne okazos en Harderwijk sed en alia fiŝkaptisturbo nome Elburg. Ni tamen vizitos Harderwijk sed montriĝis ke la restoracio ne disponas pri sufiĉe granda manĝejo por nia tuta grupo. En Elburg ni trovis tute novan restoracion taŭgan por nia celo. La plej granda parto el la aliĝintoj, ĝis nun, samtempe aliĝis por la tuttaga ekskurso. Espereble multaj ankoraŭ sekvos ĉar la solena fermo de nia kongreso dum nia restado sur la ŝipo devos fariĝi sukceso. La ŝipveturado estas unika kaj la vizito al la konstru-puto estas vere ebleĉo ĉar jam kelkajn monatojn poste la artefarita insulo estos inundita kaj ĝi estos malaperinta. Anonco dum la kongreso eblas nur se restas ankoraŭ lokoj.

L. K. K.

## ORIENTO KAJ OKCIDENTO INTERPROKSIMIĜIS

SED MULTAJ KULTUROJ RESTIS NEKONATAJ. Jam dum preskaŭ 10 jaroj U.E.A.-UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO kaj la pli vastaj tavoloj de la Esperanto-movado atente sekvas la nun finiĝontan Projekton de U.N.E.S.K.O. "ORIENTO-OKCIDENTO". Per prelegvojaĝoj kiel tiu de Joŝiko Kaĵino, la japana ĵurnalistino kiu ni bone memoras, per libro-serio kaj aliaj rimedoj, Esperanto daŭre servas por interproksimigi antipodaj, popolojn.

AL ĈIU POPOLO SIAN LINGVON, AL LA HOMARO ESPERANTON!

# 51-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

## BUDAPEST, 30-VII-6-VIII-1966-a

Sub la Alta Protektado de S-ro Oden Kishazi, Vicprezidanto de la Hungara Popola Respubliko.
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

N-ro 2 OFICIALA KOMUNIKO Rotterdam, la 10-an de ja.1966

Enirvizo: Klarigoj pri la formalaĵoj koncernantaj la akiron de vizo por Hungarujo troviĝas en pasintaj decembraj numero de "Praktiko" kaj januara numero de "Esperanto". Bonvolu atenti, ke eventuala antaŭpagita sumo estos redonita en la valuto de la paginto, nur se tiu informos pri nuligo de mendoj antaŭ ol ricevi la hungaran vizon. Post ricevo de la vizo - ĉiukaj antaŭ la 25-a de junio (vidu pri tio la Duan Bultenon) - la eventualan antaŭpagitan monon la paginto povos uzi nur en Hungarujo. Ĉiuj pliaj detaloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Oratora Konkurso: La temoj de la ĉijara Oratora Konkurso estas jenaj:
a) Estas vere malfacilege priskribi la eterne senŝanĝan homecon (Lusin);
b) Arto ne konas limojn; c) Arto-ĉu memsufiĉa aŭ tendenca?
ĉ) Internacieco de humoro; d) La rolo de Unesko por la reciproka kompreniĝo kaj amikeco inter la gejunuloj de ĉiuj kontinentoj.

Loĝiga Servo: La Loĝiga Servo ne prizorgos loĝejon por grupoj aŭ karavanoj. La partoprenantoj de karavanoj devas individue rezervi loĝejon en Budapest pere de la koncerna mendilo trovebla en la ricevota Dua Bulteno.

Karavano: Anoncis karavanon I.E.F., ĉe S-ro G.Grattapaglia, Via Pallanza, 32, Torino, Italujo.

Kotizalpago: Laŭ la Kongresa Regularo aliĝoj al U.K. estas akceptataj ĝis la 30-a de junio 1966. Personoj, kiuj deziras aliĝi post tiu dato devas alpagi al la fiksita kotizo la sumon de 25 ned.gld. aŭ egalvaloro, por kompensi la ekstrajn kostojn, kiujn prokrastita aliĝo kaŭzas.

Statistiko: (ĝis 10-1-1966): Argentino 2, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 20, Belgujo 18, Braz.2, Brit.79, Bulg.37, Ĉeĥ.27, Dan.26, Finn.14, Franc.198, Germ.90, Grek.2, Hisp.8, Hongkongo 1, Hung.285, Isl.2, Isr.7, Italujo 42, Jap.11, Jug.15, Meks.1, Monako 3, Ned.94, Norv.5, N.Z.1, Pol.37, Rum.9, Sov.6, Sved. 58, Svis.15, U.A.R.1, Urug.1, Usono 17. Entute 1136 el 34 landoj. (Pasintjare 1069 el 42 landoj). G.G.Pompilio - Konstanta Kongresa Sekretario

## TEL-AVIV GASTIGOS LA U.K. EN 1967

U.E.A. elektis Tel-Aviv (Israelo) kiel loko de la 52-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en 1967. Kelkaj aviadilaj kaj ŝipaj karavanoj jam estas en preparo.

## JUBILEO DE JULIO BAGHY

La 13-an de januaro la fama esperantista poeto Julio Baghy festis sian 75-an naskiĝtagon. Ni sendas al li la plej varmajn bondezirojn.

## VENONTAJ KUNVENOJ KAJ KONGRESOJ EN EŪROPO

INTERNACIA PASKA RENKONTIĜO: "Internacia kulturo por la junularo) en BOLOGNA (Italio) de la 9-a ĝis la 11-a de Aprilo 1966-a.
Kun granda plezuro la Itala Esperantista Junularo invitas vin partopreni duan aranĝon, kiu, kiel pasintjare, estos kiel eble plej multe internacia. Ne forgesu la daton kaj tuj rezervu ĉe Teresa Casagrande vian lokon por ne mendi ĝin tro malfrue. Jen la esencaj punktoj de la programo:
la 9-an, sabato: Alvenoj, tagmanĝo, malfermo kaj salutoj, vespermanĝo, prelego
la 10-an, dimanĉo: Matenmanĝo, prelego, tagmanĝo, vizito al la urbo, vespermanĝo, balfesto.
la 11-an, lundo: Matenmanĝo, prelego, ekskurso al ĉirkaŭaĵoj de Bologna, reveno kaj adiaŭoj.

La prezo estas fiksita je Lit.6000 kaj inkluzivas la tutan programon ek de la tagmanĝo de la 9/4 ĝis la tagmanĝo de la 11/4, kun du tranoktadoj ĉe la junulargastejo "Villa Teresa". La aliĝkotizo estas fiksita je Lit.600.

Pro organizaj aferoj bonvolu aliĝi kiel eble plej baldaŭ. La bona sukceso de la aranĝo nun dependas nur de vi ĉiuj! Informoj, sinanoncoj kaj pagoj ĉe: Teresa Casagrande, Via L.Wartema, 5 BOLOGNA (Italujo).

LA 5-a PASKA KULTURA SEMAJNO, okazos ankaŭ ĉi-jare en Grésillon, organizita de Franca Unuiĝo por Esperanto sub la aŭspicioj de la Ministerio pri Nacia Edukado. En la fama kastelo, de la 1-a ĝis la 8-a de aprilo, eminentaj esperantistoj prelegos pri diversaj kulturtemoj kaj okazos praktikaj kursoj distraj vesperoj kaj vizitoj al "Loire-kasteloj".

La partopreno al tiu aranĝo estas vere konsilinda por tiuj, kiuj deziras pliperfektiĝi en la lingvokono de esperanto, en internacia medio.

Petu klarigojnpri kosto de la restado kaj pri la rabatilo por la fervojo al: Prof-ro Babin-Lycée Pierre Loti - 5 Boulevard Buisson, 17 Rochefort-Sur-Mer-(Francujo)

ST.GALLEN (SVISLANDO), ALVOKAS AL XXXI-a KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ. La manifestacio okazos de la 21-a ĝis la 27-a de julio 1966-a. Sekretariejo de I.K.U.E. Kongreso: 9106 Zürchersmühle (Svislando).

14-a INTERNACIA ESPERANTO-FERIO-SEMAJNO: De 14-22 aŭgusto 1966 en KROMMENIE (Nederlando). La Esperanto-Grupo "Unueco" en Krommenie kore invitas vin partopreni en la 14-a Internacia Esperantista Feriosemajno.

En la programo ni prezentos: Interkonatiĝan vesperon, ekskursojn aŭtobuse kaj ŝipe, al la plej gravaj vidindaĵoj de Nederlando, fine grandan adiaŭan festvesperon. Gastigado ĉe samideanoj. Kostoj nur 70 ned.gld.

Petu pli detalajn informojn de S-ino J.A.v.d.Meulen-v.Harten, Popelstraat N.13 Krommenie (Nederlando). Limdato de aliĝo 1-5-1966.

## GRAVEGA SUKCESO DE ESPERANTO EN PALESTINO

Por la unua fojo radio jordana dessendas en Esperanton-

Estas kutimo en Palestino disaŭdigi per radio la tutan ceremonion kiu okazas dum la Kristnaska Nokto en la Groto de Betlehemo; pluraj anoncistoj parolas en multaj lingvoj. Pastro Cecchitelli disaŭdigis itale kaj esperante. Tiamaniere por la unua fojo la tuta esperantistaro en la mondo aŭskultis esperantlingve la Bonan Kristnaskon el Betlehemo!

Krome reĝisoroj de Svisa Radio kiuj preparis Kristnaskan programon, invitis P.Cecchitelli reciti la "Patro Nia"-n kiu estis dissendita en Kristnaska Nokto inter aliaj dek lingvoj.

Pastro Cecchitelli doktoriĝis pasintjare en bibliaj sciencoj en Napolo; lerta esperantisto li partoprenis la esperantan karavanon al Palestino por atingi sian katedronen la seminario de Betlehemo. Vere frue li akiris tiom da sukceso post mallonga tempo de lia alveno. Li sin turnas al bonvolemuloj por peti la sendon de ital-angl-franc-esperantaj gramatikoj necesaj al li por la pluraj lingvo-komencantoj de la kursoj. Jen lia adreso: Prof-ro P.Carlo CECCHITELLI O.F.M.- Convento di Terra Santa - P.O.B. 45 BETLEMME (Jordan)

Rose Maudente

## KARDINALO BARBIERI, ĈEFEPISKOPO DE MONTEVIDEO, FAVORA AL ESPERANTO

Ni publikigas ĉisube la penson de Kardinalo Barbieri pri Esperanto: "Ni, kiuj aspiras krei pli bonan mondon, devas rigardi kun simpatio kaj bonvolo ĉiun leĝkonforman klopodon por ligi la homojn en unuecon spitantan ĉion, kio disigas kaj distancigas. Inter la naturaj rimedoj, sur kiuj sin apogas tiu dezirata unueco, eble la plej grava estas la lingvo, kiu senpere interkontaktas la homojn. Nova universala lingvo povus atingi tiun celon. Pro tio ni vidas kun granda favoro Esperanton, kiu kunhavas ĉiujn kondiĉojn postulatajn, tuŝante neniel la idiomojn jam ekzistantajn, ŝarĝitajn per beleco kaj gloro. Pro tiuj motivoj ni formale bondeziras, por ke la streĉo farata favore al Esperanto havu plenan sukceson kaj trovu en la organizaĵoj, kiuj influas la kulturon de la mondo, apogon al ĉi tiu nobla entrepreno; tion ni esperas kun la helpo de Dio.

## LA BULGARA MONTARDOMO "ESPERANTO" JUBILEAS

Jam kvin jaroj pasis, de kiam sur la monto Vitoŝa apud Sofio oni metis la fundamentan ŝtonon de Montodomo "Esperanto", solene inaŭgurita dum la 48-a Universala Kongreso de Esperanto. Tiu ĉi bela, koketa domo estis konstruita dank' al la sindonemo de la esperantistoj, unualoke la Sofiaj, subtenitaj de la Sofia Urba Konsilantaro kaj la Bulgara Turista Asocio. Situanta meze de arbaro, sur loko, de kie la tuta ĉefurbo kaj la ebena kamparo sidiĝas kiel sur manplado, la Montodomo "Esperanto" tagnokte gastame akceptas turistojn. Tie ĉi ili povas ripozi, pasigi agrablajn horojn inter amikoj-esperantistoj kaj tranokti.

## R E C E N Z O J

"RAITIS RAUTATIELÄINEN"- Revuo de la Finnlandaj Fervojoj R.R.L.

Mi ricevis tiun revuon pri la zorgo de nia amiko Matti Voltti, sed kvankam nek povis legi nek traduki, mi komprenis ke en ĝi oni reklamas kaj parolas pri nia Esperanto Movado, ĝenerale, kaj aparte en Fervojista kampo. Mi legis ankaŭ reklamon pri "Privilegia Vojo" la mirinda Finna Esperanta lernolibro (de S-ano V.Setälä) kiun ni bone konis kaj jam uzis en niaj kursoj.

## N I L E G I S

"LA VIE DU RAIL"- (La Vivo de la Rejlo), la plej granda mondfervoja informrevuo (300.000 ekzempleroj eldonitaj) aperigas artikolojn pri ĉiuj gravaj faktoj kiuj koncernas la fervojistan esperantan agadon de niaj francaj gekolegoj. Tiuj artikoloj, ĝenerale ilustritaj, informas ĉiujn francajn kaj eĉ alilandajn fervojistojn pri la vivo de la internacia lingvo.

En la n-ro 1021 aperis la interesa artikolo "Congrés Espérantiste en Norvège" kun belaj kolorbildoj kiu bone impresis niajn neesperantistajn gekolegojn. En la lastaperinta n-ro 1031 sur la tuta paĝo aperis artikolo pri la ĝenerala kunveno en Lyono "Congrès National des Cheminots Espérantistes a Lyon", kun tri fotografaĵoj.

"REVUO ESPERANTO" n-ro 724 (3) marto 1966. Mi legis artikolon pri "La Politika Uzo de Esperanto" kaj rimarkis jenajn vortojn:. . . .

"Jam en 1924 skribis Francesco Nitti, iama ministrara prezidanto itala:"Mi donas grandan signifon al la disvastigo de Esperanto ;;eĉ el vidpunkto politika. Dank' al sia facileco, ĝi taŭgas tre bone por la rapida disvastigo de la propagando...". Nature, do, ke ĝin aplikas tiucele ĉiam pli multaj instancoj. La foje aŭdebla kritiko, ke "Esperanto estas -ista afero" (la radiko "-ista" dependas de la lando) estas tre facile respondebla mallogikaĵo. En iuj ŝtatoj, tamen, ĝi servis aŭ servas nur por kaŝi kontraŭ-internaciisman politikon, ĉar, kiel diris J.B.Tito, "La ideo de Esperanto nature ĉiam havos malamikojn inter reakciuloj, precipe inter la ekstremaj".

Lingvo ne havas statuton. Esperanton, same kiel ĉiujn aliajn lingvojn, ĉiu rajtas libere uzi por ĉiuj celoj, inkluzive de politikaj."

## ĈIUTAGAJ RADIO-DISSENDOJ EL BUDAPEŜTO

La Hungara Radio decidis okazigi, ek de februaro 1966 kaj ĝis la Universala Kongreso, regulajn ĉiutagajn 15-minutajn programojn en Esperanto. La dissendoj okazas je la 20,30 horo (Mez-Eŭropa tempo) su la ondlongoj 240 m. (mezaj ondoj) kc/s.1250 kaj 41,6 m. kc/s.7220 kaj 48,1 m. kc/s.6234 (mallongaj ondoj). Rimarkojn oni sendu al: Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Bròdy S.u. 5-7, Budapest VIII. (P.Balkanyi)

## RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - DISSENDOJ JARO 1966-a- Redaktoro: L.Minnaja

La dissendoj okazas de la h.17,35 ĝis la h.17,50 (M.E.T.). Ondlongoj metroj 31,33-41,24

APRILO 1966-a:

2042 dimanĉon: la 3-an: La itala geologo Antonio Stoppani.
2043 " " 10-an: Italaj regionoj: Piemonto.
2044 " " 17-an: La romanika skulptarto en Modena: Wiligelmo.
2045 " " 24-an: Leterkesto.